

ZPRÁVY

ĈESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Numero 15

OSVĚTOVÝ ÚSTAV V PRAZE

Aprilo 1964

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SOFIO,

okazinta de la 3-a ĝis 10-a de aŭgusto 1963 — la unuan fojon en la historio de la U. K. de Esperanto en la bulgara ĉefurbo Sofio — fariĝis unu el la plej grandaj kongresoj de UEA entute. Partoprenis ĝin pli ol 3400 delegitoj el 45 landoj de ĉiuj kontinentoj.

La plej multnombraj delegitaroj (krom bulgaroj) venis el Pollando, Hungarujo, Francujo, GFR, Italujo, Jugoslavio, Nederlando, Svedujo, GDR, kaj Britujo. La unuan fojon (post la dua mondmilito) partoprenis la Kongreson de UEA ankaŭ 35-membra grupo de Esperantistoj el Sovetunio; ĝia tre vigla aktiveco vekis grandan atenton.

Ĉeĥoslovaka delegacio estis 45-membra; el tio 2 oficialaj delegitoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (Sviták, Čambál), elsenditaj de la ministerio pri instruado kaj kulturo, plue 35-membra karavano organizita de ĈSEK pere de Ĉedok (gvid. D. Kočvara) kaj 8 delegitoj partoprenis memstare je invitoj de siaj bulgaraj amikoj.

Bela kaj abunde ornamita ĉefurbo de Bulgarujo kaj ĝia loĝantaro akceptis la kongresanojn tre amike kaj vivis la tutan semajnon efektive en signo de la Kongreso.

Honora prezidanto de la Kongreso estis la I-a vicĉefministro de Bulgarujo Georgi Trajkov; membroj de la honora komitato estis ministro de kulturo Gančo Ganev kaj pluraj elstaraj politikaj kaj publikaj reprezentantoj, inkluzive de kelkaj akademianoj. La estraro de la Kongreso konsistis el prof. d-ro Hideo Yagi — prezidanto de UEA, H. W. Holmes kaj E. L. M. Wensing — vicprezidantoj de UEA, prof. d-ro V. Peevski — rektoro de la Internacia Somera Universitato, Ĥristo Gorov — prezidanto de la Bulgara Esperanto-Asocio, Nikola Aleksiev — prezidanto de la Loka Kongresa Komitato kaj pluaj ĉefaj funkciuloj de UEA.

La Kongreso okazis en la areo de Ŝtata Universitato en la centro de Sofio kaj grandaj aranĝoj kiel la Solena Inaŭguro, artaj prezentoj, kongresa balo kaj Solena Fermo de la Kongreso en moderna sporta halo Universiado.

EN LA LABORPARTO de LA KONGRESO okazis dum la tuta

semajno kunvenoj kaj konferencoj de UEA kaj de multaj fakaj organizaĵoj, sciencaj prelegoj de ISU, seminario de Cseh-metodo por instruistoj de Esperanto k. a. — Specialan mencion meritas la 3-a MEM-Konferenco, okazinta en signo de la 10-a jubileo de la Mondpaca Esperantista Movado kaj eldonado de la gazeto PACO; ĝi pritraktis projekton de nova Statuto kaj elektis novan Internacian Komitaton de MEM. Estis aprobita teksto de telegramoj al registaroj de Sovetunio, Usono kaj Britujo pro subskribo de la kontrakto pri malpermeso de nukleaj proveksplodigoj; plue estis aranĝita manifestacia vizito en la Maŭzoleo de Georgi Dimitrov, kun dediĉo de florkronoj je honoro de tiu ĉi heroo de bulgara popolo kaj granda batalanto kontraŭfaŝismo kaj por paco.

La traktado de UEA kaj fakaj organizaĵoj dediĉis la plej grandan atenton al la Lerneja Kampanjo kaj al disvastigo de agado inter la junularo surbaze de la traktadoj je la antaŭa TEJO — Kongreso en Vraca. Ĉi tiun kongreson partoprenis kiel delegito de ĈSSR s-ano Ondráček. Kelkaj el la fakaj organizaĵoj tre proksime kontaktiĝis kun samfakaj bulgaraj organizaĵoj, eĉ kun la ministerioj (ekz. ILEI — instruistoj, TEJA — ĵurnalistoj, ISAE — sciencistoj, UMEA — medicinistoj, IFEF — fervojistoj) kaj estis invititaj al komunaj kunvenoj, ekskursoj k. s.

PŘEHLED O ČINNOSTI ČSEV A ESPERANTSKÉHO HNUTÍ V ČSSR V OBDOBÍ 1962-1963

Ĉeĥoslovanský esperantský výbor při Osvětovém ústavu v Praze pokračoval v letech 1962 a 1963 ve své činnosti v rámci Statutu, schváleného ministerstvem školství a kultury, jednak ve věcech organizačních a metodických vůči esperantským kroužkům v tuzemsku a jednak ve věcech edičních, informačních a propagačních ve styku se zahraničím.

Esperantské hnutí v Československu v tomto období vykazalo mírný vzestup zejména v českých krajích, zatímco na Slovensku v důsledku některých chyb v metodách práce a jejich řízení činnost řady kroužků ustrnula. K 30. 6. 1963 bylo u ČSEV registrováno celkem 130 EK a téměř 3500 členů. Přes 50 procent kroužků pracovalo při závodních klubech ROH, ostatní hlavně při osvětových zařízeních (OKD, OB, příp. jiných kulturních a společenských organizacích, jako PKO, ČSM aj.). Kromě toho není dosud značný počet jednotlivců, zejména v menších místech, kde nejsou kroužky, ale i v místech kde kroužky jsou, z různých důvodů do organizované činnosti zapojen.

ČSEV vydával k informaci funkcionářů organizací a esp. kroužků, dále Zprávy ČSEV, které byly tištěny z části v esperantu

k informaci zahraničního esperantského hnutí. Zprávy vyšly v roce 1962 třikrát a v roce 1963 dvakrát v počtu po 1000 výtisků, většinou v rozsahu 4 stran. Od roku 1959 vyšlo celkem 14 čísel Zpráv ČSEV.

Mimo to se podílel ČSEV na vydávání časopisu PACO — orgánu mezinárodního mírového esperantského hnutí (MEM). V roce 1962 vyšla dvě čísla (104, 106) a v roce 1963 jedno dvojčíslo (111-112). Časopis vychází v rozsahu 8 až 16 stran a je zasílán v ČSSR na EK i na jednotlivé předplatitele v počtu přes 350 výtisků a do ciziny jde asi 2500 výtisků. Úroveň čs. vydání PACA po obsahové a grafické stránce se značně zlepšila, závadou však byly zbytečné jazykové a tiskové chyby.

Při vydávání obou časopisů bylo nutno překonávat velké potíže s jejich redakční přípravou i při zajišťování tisku. Důsledkem toho bylo velké zpoždování a nepravidelnost vydání a tím i snížená účinnost.

Koncem roku 1962 (15. — 16. 12.) uspořádal Osvětový ústav ve spolupráci s MŠK a ČSEV pracovní aktiv funkcionářů EK ve Velkém Meziříčí. Zúčastnili se ho funkcionáři 40 největších EK a několik zástupců zřizovatelů. Byl na něm proveden všestranný rozbor činnosti esper. hnutí, vyměněny cenné vzájemné zkušenosti z práce EK a ČSEV, přijaty závěry a náměty pro další činnost. Náplň celého jednání byla dána k dispozici všem EK a zřizovatelům ve zvláštním 13. čísle Zpráv ČSEV. V následujícím čísle Zpráv (z května 1963) byly pak otištěny 3 vzorové pracovní plány EK. Tato akce měla velký význam pro správný rozvoj činnosti esperantských kroužků. Její program si zasloužil, aby jej absolvovali delegáti všech kroužků.

K osobnímu kontaktu esperantistů z různých EK a k výměně zkušeností se dobře osvědčily, vedle menších místních, turistických a společenských akcí, také krajské semináře a aktivity esperantistů. Takové tradiční již schůzky esperantistů Středoslovenského kraje konaly se vždy koncem května v Turč. Teplicích a koncem září v Rájeckých Teplicích. V květnu 1963 byl slavnostní aktiv esperantistů Severomoravského kraje v Přerově (100 účastníků), v červenci 1963 seminář a pracovní aktiv Východoslovenského kraje v Košicích (40 účastníků). ČSEV svolával při tom buď své plenární zasedání nebo vysílal své zástupce; využíval těchto příležitostí k prosazování konkrétních metod a forem práce i ke kritice nedostatků v činnosti kroužků.

Významnou akcí pro rozvoj aktivity hnutí, ke zvýšení jazykové úrovně funkcionářů a učitelů esperanta, jakož i pro nábor mládeže jsou tradiční letní kursy esperanta v Lančově. Tyto kursy byly v

letech 1962-63 uspořádány v rámci letních táborů organizace Svazarm v Třebíči.

V ediční činnosti bylo pokračováno v únoru 1962 upraveným a ilustrovaným druhým vydáním brožury fakta o ČSSR „JUGU MEM!“ a koncem roku upraveným druhým vydáním barevné skládačky „ČSSR v číslech“. Obě publikace vydalo státní nakladatelství Orbis nákladem po 5000 výtisků. V současné době jsou již téměř vyčerpány a měly v zahraničí velký ohlas. — V roce 1963 byly vydány tyto esperantské materiály: Malá monografie „Božena Němcová“, brožura o 20 stránkách, nákladem Osvětového ústavu v počtu 7000 výtisků; veduta Brna (ilustrovaná pamětní obálka), jako dar EK I. Brněnské strojírny účastníkům 48. kongresu v Sofii, nákladem 3000 výtisků; brožura „Velká Morava“ z podnětu EK při PKO Brno, v počtu asi 3000 výtisků; brožura „Sto let Maticе Slovenské“, 30 stran, nákladem 1000 výtisků; gratulační pohlednice k 1. máji vydal Osvětový ústav počtu 2000 kusů. I když šlo o skromné materiály vydávané s velkými nesnáze, byly příznivě uvítány ať už na kongresu v Sofii nebo našimi esperantskými kroužky jako žádoucí propagační pomůcky při korespondenci se zahraničím.

Dobře lze hodnotit také používání esperanta k propagačním akcím v oblasti zahraničního obchodu, jako např. byly prospekty Přerovských strojíren a I. Brněnské strojírny, pohlednice Skloexportiu Liberec ap. V tomto směru bylo částečně využíváno i čs. čísel časopisu PACO.

V roce 1962 byl ČSEV zapojen do spolupráce se Světovou výstavou známek „Praga 1962“ a při vydání první čs. poštovní známky s esperantským textem. Této příležitosti bylo vhodně využito prostřednictvím publikace ve všech větších zahraničních esperantských časopisech k propagaci výstavy a Československa.

ČSEV spolupracuje od počátku roku 1962 s Čs. rozhlasem na pravidelných relacích v esperantu jedenkrát měsíčně pro Rakousko. Ukázkami z kulturního a společenského života i z esperantského hnutí jsou posluchači v Rakousku i dalších zemích informováni o ČSSR. Jsou při tom navazovány s posluchači také korespondenční styky.

Protože rozvíjející se agenda ČSEV byla pro jeho členy postupně již těžko zvladatelnou, bylo přistoupeno k ustavování dalších odborných sekcí za pomoci aktivistů ČSEV pro styk s mezinárodními odbornými sdruženími a příslušnými zdejšími odbornými organizacemi. Tak byli pověřeni aktivisté pro INEVKOM — ženy (J. Cíhová), ISAE — vědci (J. Kavka), ISAKE — architekti (J. Drn). Dále byla ustavena sekce spisovatelů a překladatelů, která pomáhá při zajišťování obsahu a překladů pro PACO a ostatní publikační činnost a radiokomise pro spolupráci s Čs. rozhlasem. Z těchto sekcí vyvíjela aktivní a užitečnou činnost také komise žen, která vydává své oběžníky a navazuje styky se ženami v zahraničí, i skupina architektů, pracující při Vědecko-technické společnosti v Praze, která rozesílala čs. odborné časopisy s resumé článků na

skupiny ISAKE a zpracovává technické překlady. Uvažuje se o ustavení sekcí mládeže, novinářů, železničářů a zdravotníků.

Některé větší, aktivní esperantské kroužky, jako např. v Praze, Hradci Králové, Liberci, Poděbradech, Jihlavě, Brně, Martině aj., vydávaly k informaci svého členstva, případně ostatních EK, s nimiž jsou ve styku, vlastní věstníky a cirkuláře. Z nich rozsahem i úpravou jsou v současné době nejvýznačnější „Informa Bulteno“ pražského EK a „Esperanto-Agado“, vydávané společně esperantskými kroužky Martin a Jihlava.

V oblasti osobních styků se zahraničím byly v uplynulém období obeslány tři mezinárodní kongresy a to v roce 1962 Mezinárodní kongres železničářů-esperantistů (IFEF) v Budapešti, na který byla vyslána ministerstvem dopravy v součinnosti s ČSEV, tříčlenná delegace (Kráal, Híža, inž. Řebíček), 47. Světový esperantský kongres UEA v Kodani, na který vyslalo MŠK rovněž tříčlennou delegaci (Sviták, Hodková, Škodová) a v roce 1963 zorganizoval ČSEV ve spolupráci s MŠK, OÚ a ČEDOKEM účast početné výpravy na 48. světový esperantský kongres UEA v Sofii, včetně dvou oficiálních delegátů, vyslaných MŠK (viz souhrnnou zprávu v tomto čísle). 19. mezinárodního kongresu mladých esperantistů ve Vrace se zúčastnil jako host jeden delegát (Ondráček).

Naše účast na národních kongresech esperantistů Bulharska a Maďarska v roce 1962 se neuskutečnila, neboť návrhy ČSEV nebyly MŠK včas vyřízeny. Podobně tomu bylo s plánovaným kongresem Poláků v roce 1963 ve Štětíně, který však byl odložen na letošní rok. Tato situace nám ztěžovala navázání užší spolupráce s esperantskými svazy socialistických zemí.

Mimo tyto akce docházelo k návštěvám skupin z některých našich kroužků nebo jednotlivců při regionálních nebo místních akcích esperantistů v Polsku a Maďarsku v rámci turistického pohraničního styku nebo výprav Čedoku.

Zprávy o poznatcích našich delegací z účasti na mezinárodních kongresech byly s příslušnými návrhy předkládány MŠK (MD).

Při návštěvách zahraničních esperantistů v ČSSR, kteří přijíždějí ve značném počtu v turistických výpravách nebo i jednotlivě, na různé odborné a vědecké konference i kongresy, obchodní a kulturní zájezdy, konají naši esperantisté záslužnou a obětavou práci. Vítají a provázejí hosty, pomáhají jim často při obstarávání ubytování, uvádějí je do svých schůzek, informují je o životě u nás, vyměňují s nimi vzájemné zkušenosti atd. Tím získávají naši socialistické vlasti mnoho upřímných přátel. Je proto žádoucí, aby byly EK vybavovány potřebnými

informačními materiály a jejich členové byli náležitě instruováni.

Z uvedeného přehledu vyplývá, že ve vývoji čs. esperantského hnutí bylo v uplynulých dvou letech dosaženo mnoha pěkných úspěchů. Činnost esperantských kroužků, které byly v kontaktu s ČSEV se značně konsolidovala a byla zaměřována stále více na konkrétní kulturní, propagační a mírové úkoly. Řada závažných úkolů byla ČSEV rozpracována a je zatím ve stadiu postupného řešení. — Naproti tomu však ne všechny kroužky počínaly si při své činnosti, zejména pokud jde o styk se svými zřizovateli, dosti zodpovědně. Šlo o dva extrémy. Některé EK se uzavíraly spolupráci s veřejným děním, jiné naopak se pouštěly do organizování větších i veřejných akcí bez řádného projednání a písemného schválení příslušných správních orgánů (ONV, KNV, MŠK). V obou případech jde o praxi velmi škodlivou jak pro kroužky samotné, tak pro celé esperantské hnutí.

Na základě dosavadních výsledků a rozboru situace, vypracovaného předsednictvem ČSEV v součinnosti s Osvětovým ústavem, jsou nyní některé problémy čs. esperantského hnutí nadřízenými orgány projednávány. V dohledné době bude ustaven nový Čs. esperantský výbor, vychází čs. vydání časopisu PACO, letos vyjde druhé vydání slovníku R. Hromady a ve vydávání ZPRAV ČSEV bude pokračováno. Bude záležet hlavně na seriosní činnosti esperantských kroužků a jejich věcné spolupráci se zřizovateli i s ČSEV, abychom mohli hledět s rozumným optimismem de budoucnosti a dalšího rozvoje československého esperantského hnutí.

S v -

En kadro de la DUA INTERNACIA ARTA FESTIVALO estis aranĝitaj: Bulgara Arta Vespero, 5 teatraj prezentoj en Esperanto kaj Internacia Arta Vespero, kiuj havis grandan sukceson ĉe la kongresa publiko.

La tradiciaj kongresaj konkursoj ampleksis la Belartajn Konkursojn (en literaturo), la Oratoran Konkurson, la Deklamatan Konkurson kaj la Foto-Konkurson, ligitan al la ekspozicio de fotografiaĵoj el 12 landoj.

El aliaj kongresaj aranĝoj necesas mencii almenaŭ la amasan akcepton de kongresanoj nome de la Urbestro de Sofio, kun abundaj regalaĵoj kaj la 4 tuttagajn ekskursojn al la Rilamonaĥejo, la somera restadejo Borovec, la groto Ledenika kaj al la inaŭguro de la monto-domo „Esperanto” sur la Vitoŝa-monto apud Sofia.

Malgraŭ la komencaj malfacilaĵoj (precipe dum la amasa alveno

de kongresanoj al Sofio), ĉiuj aranĝoj de la Kongreso en la tuto rezultis potence kaj sukcesplene. Kiel esperiga fenomeno de la Kongreso montriĝis la multnombra partopreno kaj entuziasmo de junaj homoj, plejparte el Bulgarujo kaj aliaj socialismaj landoj.

La bulgaroj sciis tre lerte eluzi la eblecojn okaze de la Kongreso ĉefe al ĉiuflanka propago de socialisma konstruado kaj turisma movado en sia lando, plue al aktiva aplikado de la ideo pri paca kunekzistado kaj ne en lasta vico por plua fortikigo kaj disvastigo de la enlanda Esperanto — Movado. — La bulgara preso kaj radio, ĉefe la ĵurnaloj en Sofio, inkluzive la oficialan organon de BKP „Rabotniĉesko delo“, aperigis ĉiutage raportojn, intervjuojn, artikolojn kaj fotografiaĵojn pri la Kongreso. - Grandskala materiala kaj financa subteno de bulgaraj aŭtoritatoj kaj institucioj dediĉitaj por la aranĝoj de la Kongreso, same kiel la interrilatoj kun la bulgara popolo la plejmulton de la kongresanoj surprize kaj ĝoje impresis. Malgraŭ tio, ke certaj teknike-organizaj mankoj ĵetis iom da ombro je la kongresaranĝoj, la 48-a U. K. en Sofio estas taksata kaj de la partoprenintoj kaj de la aranĝintoj (UEA kaj BEA) kiel unu el la plej elstaraj kongresoj en la historio de la Internacia Lingvo.

ĈEĤOSLOVAKAJ KONGRESANOJ prezentis sin dum la Kongreso en reciproka kontakto kaj aktive partoprenis je diversaj aranĝoj kaj traktadoj. — La salutparolon nome de la ĈSSR ĉe la Solena Inaŭguro prezentis s-ano Sviták. Ambaŭ oficialaj delegitoj partoprenis precipe ĉiujn kunvenojn kaj interkosiliĝojn de la 3-a MEM-Konferenco kaj laŭeble ankaŭ la traktadojn de la Komitato kaj ĝeneralaj Kunvenoj de UEA (kiel observantoj); samtempe ili proksime interrilatis kun la delegacioj de socialistaj ŝtatoj kaj pritraktis la eblecojn de pli bona reciproka kunlaboro. — La ceteraj anoj de nia karavano vizitadis la kunvenojn de MEM, INEVKOM, de fakaj organizaĵoj kaj de UEA — sekcioj, partoprenis je diversaj kulturaj aranĝoj kaj je la ekskursoj. — El la aktivaj prezentiĝoj de niaj delegitoj dum la Kongreso ni citas: MEM-Konferenco - raporto kaj diskuto-Sviták, Ĉambál kaj poemdeklamo-Míčová, INEVKOM - raporto-Urbanová, TEJO kaj STELO — raporto kaj diskuto — Zachariáš, Ĝen. Kunveno de UEA kaj ILEI-Konferenco — diskuto Geleta, IGA — diskuto — VI. Kočvara, EŜLI Fiala. En la kongresaj konkursoj nome de ĈSSR sukcesis: J. Kořínek pro la originala poemo „Saluto al 48-a Kongreso“ kaj pro traduko de la poemo „Paco“ de Fr. Branislav gajnis 2 duajn premiojn kaj M. Rybáček pro la fotografiaĵoj, precipe pro la „Pli forta ol maŝino“ gajnis la trian premion. — En la internaciajn organizaĵojn estis elektitaj: Cíhová kaj Ĉambál kiel membroj de MEM-Komitato, Stankuš kiel membro de IAJE. Favore estis aprezita la agado de la ĉeĥoslovaka sekcio de arkitektoj en la kunveno de ISAKE.

Ni.a delegacio havis je dispono kaj disdonis al kongresanoj la

sekvantajn Esperanto-materialojn: po 3000 ekz. de la monografio „Božena Němcová“, de la kolora faldfolio „ČSSR en nombroj“ kaj de la veduto pri la urbo Brno, plue po kelkcentoj da ekzempleroj de la flugfolioj „Granda Moravio“ kaj de la prospektoj de Maŝin-fabrikoj en Přeřov. Krom tio niaj delegitoj estis provizitaj po kelke da pecoj de la monografio B. N., de la vidaĵkartoj de nacia artisto Martin Benka, de la broŝuroj „Matica Slovenská“ kaj de la programoj pri la elsendoj de Radio Praha por Aŭstrio al disdonado okaze de individuaj renkontoj kun fremdaj kongresanoj. La virinoj disdonis en la INEVKOM — kunveno al la delegitinoj raporton pri la agado de Ĉeĥoslovaka virina komisiono. Niaj propagandaj materialoj estis de la kongresanoj plejparte kun granda intereso akceptataj.

Kiel grava manko de nia kongresvojaĝo montriĝis ĝia malfrua organiza sekurigo, ĉefe la pago de kongreskotizoj post la difinita dato. Tio kaŭzis al niaj delegitoj multe da malfacilaĵoj kaj malavantaĝoj. Ĝena okazintaĵo estis ankaŭ memvola prezentiĝo de s-ino Míčová ĉe la Solena Inaŭguro de la Kongreso sen respekto al la preĉize planita programo. Alianmankon ni vidas en la fakto, ke el Ĉeĥoslovakio neniu estis delegita al prelego en la Internacia Somera Universitato kaj al partopreno en la Arta Festivalo.

La ĉeeston de nia delegacio je la 48-a U. K. kaj ĝian ĝenerale aktivan kaj korektan konduton oni povas taksu tre favore. Speciala danko apartenas al s-ano Drahomír Kočvara — gvidanto de la ČEDOK — grupo, kiu tre ofere zorgis pri forigo de ĉiuj malfacilaĵoj kaj helpis organizi la partoprenon je la kongresaranĝoj. Ni estas konvinkitaj, ke ankaŭ per la personaj kaj societaj interrilatoj dum la Kongreso, kaj per la propagandaj materialoj, nia delegitaro gajnis multe da novaj eksterlandaj amikoj kaj favorantoj al ĈSSR.

Ĝenerala supervido pri la kongrestraktado kaj la spertoj de ĉiuj niaj partoprenintoj estis kompilitaj en resuman raporton de la oficiala delegacio, kiu kun tiurilataj konkludoj kaj proponoj estis prezentita al la ministerio pri instruado kaj kulturo.

La ĉeĥoslovaka preso pri la 48-a Kongreso en Sofio kaj pri la partopreno de nia delegacio aperigis serion de informoj kaj artikoloj. Pli grandan artikolon pri la rezultoj de la kongresa traktado alportis la ĵurnalo „Večerní Praha“ en formo de intervjuo kun s-ano Sviták la 16-an de aŭgusto 1963; same la Radio Praha dediĉis sian Esperanto — disaŭdigon por Aŭstrio la 29-an de aŭgusto al raportado pri la Kongreso. La Bulgara Kulturcentro en Praha aranĝis la 24-an de oktobro 1963 publikan

interparoladon kun la kongres-partoprenintoj (Sviták, Urbanová). En la Esperantista Klubo ĉe DKD en Praha okazis prelego kaj interparolado pri la 48-a Kongreso jam la 16-an de aŭgusto; ĉeestis la karavano de kongresanoj el Belgujo, Nederlando, Francujo kaj Britujo, revenantaj el Sofio, kiuj plejparte sprite kaj elokvente rakontis pri siaj travivaĵoj dum la Kongreso kaj vojaĝo. — Preskaŭ ĉiuj ĉeĥoslovakaj delegitoj post la reveno el Sofio prelegis pri siaj kongresaj spertoj en lokaj Esperanto — rondetoj kaj en publikaj kunvenoj; ili samtempe prizorgis raportojn en la regionaj, lokaj kaj uzinaj gazetoj kaj memkompreneble en la klubaj bultenoj kaj cirkuleroj.

Nome de ĉiuj ĉeĥoslovakaj delegitoj je la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio ni certe povas proklami, ke ni ĉiuj akiris multon da valoraj spertoj por plua laboro en la Esperanto — Movado. Ni kredas, ke spite al diversaj malfacilaĵoj kaj suferoj dum la vojaĝo, restos al ĉiuj pri la Kongreso kaj nia restado en Sofio multaj belegaj, neforgeseblaj impresoj kaj rememoroj. Sv

VIRINA KOMISIONO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Antaŭ la 48-a Universala Esperanto-Kongreso en Sofio aperis Cirkulero informanta pri ĝisnuna laboro de Virina komisiono de ĈSEK. Ĝi estis sendita al ĉiuj aliĝintaj virinoj el Ĉeĥoslovakio kaj al ĉiuj membrinoj de INEVKOM. Dum la Virina kunveno en Sofio ĝi estis disdonita. Celo de la komisiono estas ligi kiel eble plej larĝan leterkontakton kun virinoj en ĉiuj kontinentoj, precipe de landoj malplí evoluintaj. — El la Respubliko aliĝis pli ol 50 virinoj el 17 lokoj. Laŭbezone ili ricevas Cirkulerojn kun informoj pri demandoj organizaj, tie ili trovas adresojn de virinoj el eksterlando, eltiraĵojn el interesa korespondaĵo eksterlanda. La Cirkuleroj estas uzataj kiel instrumaterialo por virinoj en aliaj landoj, kie ĝis nun ne eklaboris Virinaj komisionoj. — Al ĉiuj aliĝintaj virinoj estis sendita la broŝuro „Juĝu mem!“ de profesoro Miloš Lukáš, kiu povas servi kiel materialo por perfektigo en lingvo internacia, kaj kiel materialo pri la faktoj en Ĉeĥoslovakio. Tiujn konojn oni povas eluzi kiel unu el konvenaj temoj por korespondado kun eksterlandaninoj. — Estis dissendita ankaŭ la „Historio de ekesto de Internacia tago de virinoj“ en traduko de M. Kubíčková el „Femmes du monde entier“, jarkol. 1960, n-ro I. Virina komisiono de ĈSEK estas en vigla koresponda kontakto kun Aŭstrio, Bulgario, Estonio, Francio, Hungario, Italio, Kanado, Nederlando, Pollando, Norvegujo, Rumanio, Vjetnamio, Sovet-Unio. — Je peto de W. Eichholz ni surbendigis por la magnetofona servo de UEA sonbendon kun

prelego de Frant. Polanský, kunlaboranto de Muzeo de J. A. Komenský en Uherský Brod en esperantlingva traduko. — Okaze de la Internacia tago de virinoj 1963 ni sendis amase subskribitajn bildkartojn al virinoj en diversaj landoj. — Virina komisiono de ĈSEK regule kunvenadas nun ĉiun unuan mardon en la monato, pritraktas organizajn demandojn, konversacias nur en Esperanto. — Kune kun esperantistoj el Kladno de temp' al tempo ni aranĝas programojn ekster Praha. Ekzemple jam dufoje ni vizitis la lokon Lidice, kie antaŭ la monumento de la mortpafitaj viroj estis deklamita poemo dediĉita al virinoj de Lidice. La poemo poste estis transdonita al Loka Nacia Komitato kun subskriboj de la partoprenintoj. — Al Gusta Fučíkova 60-jara ni gratulis kaj sendis la Cirkuleron. — Kompreneble la ĝisnuna laboro de la Virina komisiono estas prepara, ĉar ĝi intencas proponi sian servon pere de Esperanto al „Výbor československých žen“, precipe por ligo de internaciaj rilatoj ĉe paca kunlaboro. J.C.

LA GRUPO DE ESPERANTO-VERKISTOJ KAJ TRADUKISTOJ EN ĈSSR

pri kies ekesto ĉe ĈSEK ni informis en la maja numero 1963, ĝuste povus festi sian unuan naskiĝtagon.

La ĉefa celo de tiu ĉi institucio estis, laŭ teksto de la informa alineo, „faciligi kaj plibonigi la laboron en la literatura fako“. Ĉu la prepara komitato, resp. ĝia sekretariaro, tiun celon atingis? Alivorte, ĉu tiu ĉi datreveno estas festinda, aŭ ne?

La unua tasko de la sekretariaro estis, kunmeti liston de tradukoj, jam faritaj aŭ komencitaj, por eviti vanan laboron. Tiu ĉi listo nun ekzistas, kaj ĉiu, kiu ekemas ion traduki, povas sin informi, ĉu lia laboro hazarde ne estas jam farita, ĉe sekretarino Jana Cíhová, ĈSEV, Praha 2, Blanická 4, aŭ rekte per telefono 81326. Ankaŭ originalaj verkaĵoj estas plejparte troveblaj en simila listo, tamen nur se la aŭtoroj ilin jam anoncis. Versimile ekzistas multaj verkaĵoj kaj tradukoj, faritaj inter la jaroj 1952 kaj 1962, kies aŭtoroj tute perdis kontakton kun la movado, kaj sekve aŭ lasis iliajn verkojn kuŝi en la tirkesto, aŭ publikigis ilin eksterlande. Estas nun nur demando de fido al ĈSEK kaj la sekretariaro de verkistoj, ĉu la kartoteko estos kompletigata aŭ ne. Ni ĉiuj firme kredas, ke ni tiun fidon iom post iom akiros, ĉar sen ĝi nia tuta laboro estas nebla.

La unua komunikilo inter la komitato kaj la anaro estis la „Cirkulero de verkistoj“, kiu aperis 6 foje kaj pli malpli nur informis pri organizaj aferoj. Ĉu iu ĝin legis aŭ ne, pri tio la eldonintoj nenion eksciis. Estas vere, ke je nia alvoko venis

kelkaj kontribuaĵoj por PACO, sed tiuj plejparte ne respondis al la linio, starigita de la redakcio, do tiu kontakto gvidis pli al miskompreno ol al komprenemo.

Ĉar nura informado de niaj anoj tute ne sufiĉis por atingi nian celon, ja eĉ nur por proksimiĝi al ĝi, junio 63 ni provis reformi nian „Cirkuleron“, titolis ĝin „Cirkulletero“ kaj transprenis la iniciaton. Ekde tiam, ni ne nur informis, sed starigis rekte la plej proksimajn taskojn al niaj anoj. Kaj jen, estante ĉiuj longjaraj korespondantoj, ili subite eksentis, ke „leteron ne respondi ne decas“, kaj komencis skribi. Tiu ĉi kontakto estas tre kara al ni, ĉar el respondo al tute simpla demando ofte evoluas interese ga diskuto, ekzemple pri novaj teknikaj vortoj, esprimoj por novaj socialismaj nocioj, influo de la samtempa ĉeĥoslovaka poezio al la kreado de niaj Esperanto-verkistoj k.t.p.

Nu, tiun unujaran jubileon ni ankoraŭ ne festu, sed kiel Esperantistoj ni prefere esperu, ke tiu ĉi amika kaj sincera kontakto inter niaj anoj pere de la C-letero ankoraŭ kreskos kaj plivigliĝos. Domaĝe nur, ke niaj plej gravaj korespondantoj kutime lasadas pasi 3-4 monatojn inter la ricevo de la C-letero kaj sendo de la respondo, ne konsiderante, ke la resumado de la respondoj ankaŭ postulas kelke da tempo. Fx

ĈESKOSLOVENSKÝ TISK A ESPERANTO

V minulém roce se podstatně rozšířil počet zpráv v čs. tisku, zejména pokud jde o velké deníky vč. Rudého práva. Množství krátkých informací i větších zpráv bylo publikováno o 48. světovém esperantském kongresu v Sofii. Objevily se i větší články v kulturních a jiných časopisech zabývající se blíže účelem esperanta jako mezinárodního jazyka. Příznačným rysem všech těchto zpráv byl vcelku jejich většinou příznivý nebo aspoň objektivní obsah, i když se v nich vyskytly některé nedostatky informovanosti pisatelů, nebo byly současné uvedeny i názory odpůrců esperanta. Je to každopádně pro rozumné stoupence mezinárodního jazyka příznivý úkaz v postoji našeho tisku.

Podobný, větší článek pod názvem „Spasí esperanto svět?“ od Jiřího Vančury byl otištěn v deníku Mladá fronta ze dne 10. prosince 1963. Šlo o polemickou úvahu o poslání a možnostech esperanta jako mezinárodního jazyka, kde autor uváděl některé argumenty pro a proti, kritizoval —celkem právem— některé

metody používané esperantisty při propagaci této řeči, avšak základní otázku článku — má se mladý člověk učit esperantu? — nechal otevřenou.

Jak na tento článek reagovali esperantisté? Podle našich informací psali redakci ve velkém počtu jednotlivci, řada esperantských kroužků a kolektivů. To je dobré, redakce vždy vítá ohlas čtenářů. Jinak je to už se způsobem či tónem zasílaných dopisů. Byly většinou podrážděné až útočné a obsáhlé. Umírněný a celkem velmi pěkný dopis napsal naproti tomu např. soudruh L. Chytil z Přerova.

Dalo by se předpokládat, že autor článku právem dojde k přesvědčení, že podle varování svých přátel si neměl s esperantisty nic začínat. Naštěstí se tak nestalo, což nasvědčuje tomu, že sám je asi příznivcem esperanta. Uveřejnil totiž odpověď na odezvu esperantistů opět ve větším článku v Mladé frontě ze dne 15. února t.r. pod titulem „Ještě jednou o esperantu“, který je napsán velmi slušným tónem. Tento článek, stejně jako článek původní, i když obsahuje několik sporných názorů a problémů, můžeme — podle našeho přesvědčení — považovat za velmi účinnou a vítanou propagaci pro esperanto. A co my chceme přátelé? Šířit a propagovat praktické používání mezinárodního jazyka ve všech oborech lidské činnosti v současném světě. Tomu by nesloužily zastaralé, sektářské formy činnosti esperantistů, ani prudká nebo nerozumná reakce na každou zprávu v tisku, případně zmínku v rozhlase neb televizi, která může nezaujatou veřejnost spíše odradit než získat. Správné je reagovat vždy a hojně, avšak korektní formou, ne příliš obšírně a při kritice používat věcné a taktické argumentace. Vhodné je při těchto příležitostech nabídnout zároveň redakcím zajímavé zprávy z esperantského tisku, které u nás nebyly ještě publikovány, nebo jiné příklady společenského uplatnění esperanta.

Nakonec doporučujeme zopakovat si výňatek ze zásad informace o mezinárodním jazyku „Deklarace z Frostavallen“, pokud jde o základní chyby, jichž se esperantisté obvykle dopouštějí; toto poučení bylo uveřejněno ve Zprávách ČSEV č. 10 z roku 1962. Sv

INFORMACE PRO MLÁDEŽ

ČSEV má v úmyslu obnovit esperantské mládežnické hnutí v ČSSR a navázat tak na dobrou tradici dřívějších let. Žádáme proto všechny kroužky, kde pracuje mládež, aby přihlásily své zástupce, kteří jsou ochotni pracovat v sekci mládeže při ČSEV.

V přihláškách uveďte příjmení a křestní jméno delegáta, data narození, bydliště zda je členem ČSM a jaké má zkoušky z esperanta (zda stupeň A, B, C nebo D). Kroužek může přihlásit i více zájemců o práci v mládežnickém hnutí.

Přihlášky zašlete co nejdříve na: Osvětový ústav v Praze, ČSEV, sekce mládeže, Blanická 4, Praha 2.

HOLANDESKO: Začátkem roku 1964 počal vycházet mezinárodní esperantský časopis mládeže „KONTAKTO“. Má 12 stran formátu 19 x 27 cm zpestřené fotografiemi a čtyřstránkovou obálku. Je tištěn na křídovém papíru. Vyjde 4x do roka. Roční předplatné asi 16,— Kčs. Předběžné přihlášky zasílejte na Československý esperantský výbor, Blanická 4, Praha 2.

MAĎARSKO: V Maďarsku byla ustavena maďarská sekce TEJO jako mládežnická komise HEA s více než 200 členy. Uspořádá Mezinárodní mládežnický esperantský tábor u Balatonu ve dnech 9. až 20. 7. 1964. Informace: Hungara Esperanto-Junularo, Petöfi S. u. 17, Budapest V., Maďarsko.

POLSKO: Polská esperantská mládež zve na mezinárodní esperantský tábor ve dnech 12. až 26. 7. 1964. Informace: Pola Esperanto—Junularo, Dubois 3, Wrociaw, Polsko. J. O.

SLOVNÍKY. Podle sdělení Státního pedagogického nakladatelství v Praze, vyjde v tomto roce v nákladu 10 000 výtisků druhé vydání Hromadova kapesního slovníku Esperantsko-českého a česko-esperantského. Zajistěte si jej v prodejnách n. p. Kniha.

Pro nedostatek místa, uveřejníme další zprávy v příštím čísle.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VYBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKIA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Řídí redakční kruh — Redaktas la redakta komitato: J. Cíhová, Dr. L. Izák, J. Ondráček, F. Sviták. V. Tyráček. Tiskla — Presis: Grafia 31